# LA PACDEFENDANTO

N-o.28. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ČEĤOSLOVAKIO Aprilo 1954.

## F O R K U N L A M A R R - K A J M E Š Č A N I Ŭ O V I S M O !

Al la artikolo,titolita „La rusa lingvo-ne perdebla helpanto por nia konstruado",kiun ni tradukis el la centra organo de la čsl. kom.partio kaj prezentis en LA PACDEFENDANTO al niaj legantoj, ni ricevis multajn kritikajn respondojn el kiuj ni opinias la ĉi suban kiel plej interesan kaj instruan por niaj legantoj.

Mi havas antaŭ mi dekdu ekzemplerojn de la KOMUNISTA MANIFESTO, ĉiu en alia lingvo.Plurajn mi mem scipovas legi kaj mi scias, ke tiu teksto entuziasmigis milionojn da laboristoj kaj ankoraŭ entuziasmigas ilin pro gia vereco.Estas tute egala,ĉu Franco legas ĝin france, aŭ Anglo angle,aŭ Ruso ruse,aŭ Ĉino ĉine.Estas aroganteco,se iu asertas,ke nur tiu lingvo,kiu estas sia gepatra,estas sufiĉe klara,por redoni ĉiujn pensojn.Kutime homoj, kiuj apartenas al tiu grupo,mem ne majstras alian lingvon ol sian gepatran.Kiel facile mi kiel Germano povus fanfaroni pri mia gepatra lingvo: La lingvo de Karl Marks k. Frederiko Engels,la lingvo de granda verkisto Goethe kaj Henriko Heine.Mi povus citi poemojn kaj prozojn de niaj grandaj poetoj,en kiuj ili laŭdas germanan lingvon. Sed ne - mi ne estas sufiĉe malmodesta por fari tion.Mi scias, kiel fieraj ankaŭ estas la Rusoj pri la lingvo de Lenin kaj Stalin,de Puškin kaj Nekrasov.Mi scias,kiel fieraj estas la Francoj pri la lingvo de Moliére kaj Viktor Hugo. Kiu popolo ne ŝatus sian lingvon?! Kiu popolo ne havus siajn poetojn,kiuj esprimas la sentojn de sia popolo, ja esprimas ilin per majstraj vortoj eĉ. La agnosko de tiu vidpunkto en Sovjetio post la Granda Oktobra Revolucio ja ankaŭ rezultigis ke ĉiu popolo en Sovjetio ekrajtis lerni kaj instrui en sia propra lingvo.

Milionoj da homoj en Sovjetio studas Leninismon-Stalinismon ne en rusa lingvo,sed en iu el la kelkdekoj da lingvoj,kiuj en la granda sovjeta patrio estas parolataj,sen ke la homoj hontas pri tio.

Mi vidis en Sofio la verkojn de Dimitrov kaj mi pensis:"Jen neniu en nia lando scias ion pri tiuj verkoj.Tio estas treege domaĝa." Sed kiel povus esti publikitaj tiuj verkoj en nia lando? Ĉu en bulgara lingvo? Ĉu en rusa lingvo? Memkompreneble nek en bulgara nek en rusa,sed nur en germana! Pere de miaj korespondantoj mi scias pri ampleksaj verkoj de Maŭ Ce Tung.Ankaŭ ili en Germanio nur per germana lingvo povus esti diskonigataj.

Por kontraŭi imperiisman influon en Popoldemokratioj ĉie la rusa lingvo fariĝis obligata lernfako. Ja estas fakto,ke en la kadro de Popoldemokratioj la rusa lingvo jam ludas certan rolon.Sed nur limigitan. Post kvarjara elementlerneja studado neniu junulo scias legi simplan rusan libron. Ankaŭ plej bonaj lernantoj ne scias korespondi ruse post kvarjara lerneja studado. Ĉu nun multaj ricevas tiom da instigoj en la lernejo,ke ili perfektiĝas post la elementa lernejo? Ĉiujare rekomenciĝas kursoj por la rusa lingvo en la popolaj Altlernejoj.Se komenciĝas kurso kun normala nombro

Zčt 01 - 5769-53

da partoprenantoj,tiam tio plejofte rapide ŝanĝiĝas post kelkaj lecionoj. Tiel la kurso en nia distrikto en urbo kun ca.30.000 loĝantoj konsistas el kvar partoprenantoj,inter kiuj du estas esperantistoj./Do la scio de Esperanto tute ne malfavoriĝas studon de ali-aj lingvoj!/.

Ni ĉiuj en la Popoldemokratioj lernas multon de niaj sovjetaj amikoj.Tornistoj sovjetaj,masonistoj,terkulturistoj,pedagogoj,kuracistoj vizitis nin en niaj deĵorlokoj kaj ĉiufoje ni multe profitis el tiuj vizitoj. Ni legas sovjetajn verkojn,studas sovjetajn gazetojn - sed ĉion per nia gepatra lingvo,ĉar ĉiuj ideoj estas tute bone tradukeblaj.Ne la formo tiel gravas,sed la enhavo. Mi ne speciale preferas anglan lingvon, sed mi opinias,ke,se Gordon Schaffer ekparolas,tiam li certe parolas por la paco; mi ne speciale pre-feras la francan lingvon, sed mi scias,ke,se Jolliot Curie ekparolas,tiam li parolas por la paco. Aliflanke ankaŭ Trocki parolis ruse,eble eĉ ne mallerte,kaj mi opinias,ke tiuj paroloj certe ne estis pacemaj. Cetere estas jam enua ripeti ĉiam tion,kion diris jam multe pli bone J.V.Stalin,nome,ke la lingvoj rilate al la klasoj estas indiferentaj,ke kontraŭaj klasoj sin servas de la sama lingvo.

Laŭ mia opinio ĉiuj ,tiuj frazoj de"Lingvo de la progreso" "la lingvo de la paco" nur estas la heredaĵo de la longjara „marksisma lingvoscienco" de Marr kaj de Meŝĉaninov,kies ĉefa eraro estis la doktrino,ke ekzistas "klaso-lingvoj". Ke tiu falsa doktrino kaj la malŝato de Esperanto -kies patro ankaŭ estis Meŝĉaninov-tiel obstine restas,nun post la majstra verko de Stalin pri marksismo kaj lingvoscienco,en kiu ja ankaŭ speciale temis pri Meŝĉaninov, estas miriga. Jen mi citas: "Formiĝis izolita grupo de„senerarај"gvidantoj,kiuj ,ŝirminte sin kontraŭ ĉiu ebleco de kritiko,aŭtoritative agis kaj fiagis." Guste tiu figrupo da "scienculoj" kun Meŝĉaninov kiel gvidanto nun ankoraŭ daŭras efiki.

Kion mi povas konkludi? La studo de la rusa lingvo en la nuna tempo,kiam ni tiom povas lerni de niaj sovjetaj amikoj estas tre rekomendenda por - ĉiuj lingve talentitaj homoj.Ni bezonas multajn tradukistojn kaj interpretistojn; sed sur kampo de amasa popola interligo neniu nacia lingvo,ankaŭ ne la rusa,povas egali Esperanton, ĉar nur Esperanto estas tiel facile lernebla,ke preskaŭ ĉiu homo ĝin povas majstri kiel sian gepatran lingvon post nur mallonga studado.

L.Schödl - D.D.R.

Eventual.kritikon peras la red.

## DU SAMAJ KAPRICOJ

La gvidantoj de la usona bloko ne inklinas agnoski la Ĉinan Popolan Respublikon,kvankam temas pri reĝimo,kiun aprobas milionoj da homoj.

Alia bloko rifuzas agnoski la internacian lingvo Esperanton, kvankam milionoj da ĝiaj adeptoj ĝin jam parolas kaj praktike uzas.

R. Burda

## NOVA REAKCIA LEĜO

Laŭ informoj el Japanio disvastiĝas en la tuta lando akra batalo kontraŭ propono de nova leĝo fare de la japana registaro,kiu mal-permesas al la geinstruistaro ĉian politikan agadon.

Kiel konate,la japana instruistaro persiste batalas por eduko de novaj homoj,por pacama kaj liberecema Japanio,progresema kaj sendependa de militarismaj influoj. En tiu senco ankaŭ estas edukataj la japanaj infanoj de siaj instru-istoj. Tio kompreneble ne plaĉas al la kapitalista reakcio kaj pro tio ĝi klopodas per nova leĝo fer-mi al la progresemaj geinstruistoj la buŝon.

Proteste kontraŭ tiu ĉi reakcia leĝo-propono la instruistoj fermis la 15.de marto ĉirkaŭ 70 % da japanaj lernejoj.En Tokio men fer migis 81 procentoj da diversaj lernejoj. Post alvoko de la tut-japana instruista sindikato procedas en la tuta lando kunvenoj kaj demonstracioj kontraŭ tiu ĉi registara leĝo-prpono,per kiu ĝi intencas silentigi la instruistojn

La japanaj instruistoj akceptu nian varman simpati-esprimon!

## N I A  M O V A D O  E N  Č E Ĥ O S L O V A K I O

**Č.BUDĚJOVICE**, nia klubo vegetas. Kiam ni ankoraŭ posedis klubejon, ni devis forigi la Esperanto stelon, ĉar ĝi faris propagandon por Esperanto. Ni troviĝas en malfavora situacio ne povante trovi ejon por arango de kursoj kaj kunvenoj SVIT, post malsaniĝo de nia k-dino J.Kaczerová, kiu rompis sian piedon dum skiveturado, nia kluba laboro iomete stagnas. Regas granda intereso inter infanoj de nia mez-lernejo por kiuj ni baldaŭ arangos kurson.

**KLATOVY**, la rondeto kunvenadas regule kaj klopodas ĉiamaniere disvastigi nian movadon. Nova kurso funkcias en iu apoteko, kies estro, ankaŭ esp-isto, disponigas ejon post la vespera fermo.

**PLZEŇ**, la jam anoncita kurso kun 20 lernantoj komencis la 10.de marto kun nur 10 lernantoj, sed ĉiuj havas seriozan intereson kaj bone lernas. Estas espero, ke ili restos fidelaj. La rondeto kunvenas regule ĉiu merkrede de la 19. horo en gastejo "U Fišerů", Sedláčkova ul.39. Partoprenas 20-30 personoj.

**DOKSY**, la grupo de esp.-pacdefendantoj sukcesis instigi la nacian distriktan packomitaton por protesti kontraŭ la malpravaj kondamnoj en la MACUKAŬA-jugproceso. La distrikta packomitato per flugfolio alvokis la naciajn komitatojn de Doksy, Bělá p.Bezd., Dubé, Skalsko kaj Katusice, la distriktan Nacian komitaton, la distriktan komitaton de la Popola Fronto kaj ĉiujn entreprenajn kaj uzinajn sindikatajn konsilantarojn por protesti kontraŭ tiu maljusteco pere de leteroj sendotaj al Esperanto-Tusinsya, P.O.kesto 5, TOYONAKA, Japanio. La nomitaj instancoj estis ankaŭ petataj publiki ĉiujn detalojn pri tiu proceso en siaj gazetoj, radiodisaŭdigoj kaj kunvenoj.

Jen ekzemplo, kiel boneĝe eblas al niaj gekamaradoj akiri kontaktojn kun la Naciaj Packomitatoj, donante Esperanton al praktika servo por la defendo de la paco kaj la viktimoj de tiu batalo.

**NI ESPERAS**, ke por la venonta n-o. niaj k-doj.sendos pli da raportoj por tiu ĉi rubriko.

---

## „AŬSTRIA PACRONDO ESPERANTISTA"

Certe multaj abonantoj atendas senpacience la alvenon de tiu ĉi interesa bulteno, kiu estis eldonata en periodo de 2 monatoj. En tiu ĉi jaro, kvankam jam pasis tri monatoj, niaj aŭstriaj k-doj. ankoraŭ ne eldonis ĝin. Ĝia redaktoro, k-do.Balague fariĝis ĝen.sekretario de "MEM" kaj tiu funkcio lin tre okupas, sed estas ne kredebla, ke en St.Pölten aŭ alia aŭstria urbo ne troviĝus pluaj kapablaj gek-doj, kiuj povus daŭrigi la eldonadon de tiu ĉi bona informa bulteno. Pro tio nia redakcio ne plifrue povas akcepti abonkotizojn por 1954, ĝis kiam ĝi ne havos certecon pri ĝia plua aperado.

## A T E N T I G O

En la monato majo denove estas je nia redakcio la vico por eldoni la oficialan organon de "MEM"- PACO. Tio signifas, ke ĉiuj, niaj abonantoj ricevos anstataŭ LA PACDEFENDANTO denove la "PACON", ĉar ne eblas al ni eldoni en la sama monato ambaŭ bultenojn. La ĉeĥosl.gek-doj. PACO-abonantoj kompreneble povus plendi, kiam ili en tiu monato devas kontentiĝi sen ricevo de LA PACDEFENDANTO. Sed ni kredas, ke ili pardonos al nia redakcio, ĉar pli ampleksa eldono de "PACO" ja parte rekompencas ilin. Dume la aliaj, kiuj profitas ne forgesu sendi "municion por nia batalo", ĉar 10 paĝa eldono de "PACO", kiun ni liveros al ĉiu abonanto, kaŭzas al nia administracio certe pli da elspezoj ol ordinara 4-6 paĝa eldono de LA PACDEFENDANTO.

## NIA PAC-PROPAGANDA LETERPAPERO

Ĉiuj pacdefendantoj uzu por sia korespondado nur nian leterpaperon kun packolombo de Pikas kaj surskribo PER ESPERANTO POR LA MONDPACO. 50 paperoj de granda formato kun kovriloj kostas 10.-Kčs aŭ 14 intern.resp.kuponojn.

Mendu ankoraŭ hodiaŭ ĉe:
K-do. Josef R E I S E R, Krajská správa spojů, P L Z E Ň, Ĉeĥoslovakio.

## LITERATURON POR ĈIU

Ĉar multe mankas Esp-literaturo en nia lando,ni decidis aranĝi migrantan bibliotekon laŭ propono de k-do.Zmeškal el Praha.Tiu biblioteko konsistos el libroj kaj broŝuroj eldonitaj en diversaj landoj.Kontraŭ pago de nura poŝtafranko ni prunte sendos al ĉiu loko de Ĉeĥoslovakio niajn librojn senpage aŭ por libervola donaco,uzota por aĉeto de pluaj novaj libroj.Vi povas elprunti aŭ unu aŭ kelkajn librojn laŭ al vi sendota katalogo, kiun vi petu ĉe: K-do.Al.Zmeškal, Celetná 2,PRAHA I. Niajn eksterl. gek-dojn ni petas,ke ili afable donacu al la supre menciita adreso siajn event.superfluajn librojn k. broŝurojn por pliriĉigi nian bibliotekon.Ni antaŭe jam dankas.

## „NI NE POVAS SILENTI"

Estas 40 paĝa broŝuro kun ilustraĵoj,verkita de eminentaj japanaj kuracistoj pri la efiko de la atom-malsano. Kun tiu verko devus ĉiu progresema homo interkonatiĝi. Nia redakcio disponas ankoraŭ malgrandan kvanton.1 ekz. 6.-Kčs.

## SLOVAKOJ VEKIĜU !

Jam estas„5 minutoj antaŭ la 12a". Viaj kamaradoj Dušan Kostolný el Prakovce kaj Milan Neubeler el Poprad jam aktive laboras por veki ĉiujn dormantajn slovakajn esperantistojn.Interesa slovaka bulteno aperas,kiu jam longe vane atendas viajn raportojn. Ĉu vi ne havas intereson reorganizi viajn fortojn sub la moto "Per Esperanto por la mondpaco" ? Ne rifuzu vian kunlaboron kaj aliĝu tuj,ankoraŭ hodiaŭ ĉe:
K-do.Milan Neubeler,Poprad 4,Slov.

## NIA MIGRANTA EKSPOZICIO

kiu konsistas el kvin grandaj lignaj kestoj,transporteblaj al ĉiu loko de nia lando,estas tre grava helpanto en nia batalo kontraŭ ĉiuj skeptikuloj kaj kalumniantoj de Esperanto.Ĝi prezentas la batalon de la diversaj nacioj por la paco kaj plibona estonto,kiu estas trafe demonstrata per grandaj belkoloraj afiŝoj,bildoj,fotoj, gazetoj kaj alia materialo,akirita pere de Esperanto kaj helpe de niaj tutmondaj gekamaradoj. La ekspozicio estas facile instaligebla,konsistante plejparte el stari-geblaj aŭ pendigeblaj tabuloj, kiuj povas plenigi halon de 300-400 kvadratmetroj.Petu informojn ĉe k-do.Rudolf Zanáška,Jiráskova č.442,KOPŘIVNICE,Moravio.

## MUNICIO POR NIA BATALO

K-do.V.Kaplánek-Mar.Lázně...10 Kčs
K-do.Jan Valeš-Praha........ 5 "
K-dino.M.Vybulková-Hrad.Král.5 "
K-do.J.Macner-Liberec.......10 "
K-do.Alois Zmeškal-Praha.... 2 "
K-do.R.Bystřický-Plesná..... 5 "
K-do.Fr.Černý-Brno-Černovice 5 "
K-do.Vl.Horák-Karl.Vary..... 1 "
K-do.L.Magera-Ostrava,Mar.H. 2 "
K-do.Robert Lipka-Karviná...10 "
K-do.J.Ploss- Č.Budějovice.. 2 "
Soldato,J.Rakyta-Hroby...... 5 "
K-do.R.Tomiczek-Karviná..... 3 "
K-do.Eugen Matirko-Košice donacis 500 ciklostilpaperoj por nia bulteno.
Al ĉiuj donacintoj ni esprimas nian elkoran dankon.
K-dino Julie Šupichová el ĉi tie esprimas al ĉiuj gratulintoj okaze de ŝia naskiĝfesto sian plej sinceran dankon.

## KORESPONDI DEZIRAS :

K-do.ROZGONYI Ferenc,Dimitrov 2, Mezöberény,Hungario,kun ĉ.landoj interŝanĝas il.p.k.kaj p.m.
K-do.Liu Zyn /24 jara teknikisto/ 261,Taiping Chieh,Peikvan Chü, Ĉinio,MOUKDEN.Pri geknabaj legaĵoj kaj bildrakontoj kun ĉiuj landoj.
F-ino.Anna Lise Christensen,Hórning Central,Volk Mólle,Danmark, /komencantino/kun ĉiuj landoj.
K-do.Lennart EDMAN,Vatugatan 14, KIL,Svedio,serĉas korespondantojn por 7 komencantoj.

4linia anonco kostas 2.-Kčs.

Eldonis: Závodní klub ROH-odbor ESPERANTO,TATRA,n.podn.KOPŘIVNICE
Redaktis: K-do.Rudolf BURDA, Palackého náměstí č.6, P L Z E Ň.
Č E Ĥ O S L O V A K I O